
# starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1978 • 2 • (66)





GALERIO ZLATÁ ULIČKA

DÍLO
PODNIK ČESKÉHO FONDU
VÝTVARNÝCH UMĚNÍ

Pražský hrad, Praha 1 /Praga Kastelo, "Ora Strateto"/

bildoj, grafikaĵoj, plastikaĵoj, vitro kaj art-juveloj de nuntempaj plastik-artistoj

vendo-tempo: mardo ĝis dimanĉo 9-17 horo
/lunde fermita/


# Hungara ministro pri IL

D-ro J. Bíró, ministro pri ekstera komerco de Hungara Popola Respubliko donis intervjuon al Világ és Nyelv, en kiu li i.a. diris:

Reala tasko povas esti nur la konstanta antaŭpreparado k. akcelado de la oficiala rekono de la internacia lingvo ĉe konvenaj forumoj de diversaj landoj. Nur poste la demando povus esti prezentita al la kompetentaj internaciaj forumoj. Estus naiveco kredi, ke tio estas celo rapide atingebla, sed ankaŭ estus krimo diri, ke tiu afero ne progresos, ke ni ne okupiĝu pri ĝi...

En la internacia politiko ni devas atingi solvon de la lingvaj problemoj koncernantaj ĉiujn popolojn de la mondo per interkonsenta akcepto de la ekzistanta internacia lingvo kaj per ĝia instituciа, deviga lerneja instruado.

• • •

## ESPERANTA KVARONHORO EL MOSKVO

La anoncita Esperanto-elsendo de Radio Moskvo okazis laŭprograme la 4an de februaro, kun ripetoj samtage kaj dimanĉe, kaj daŭris ĉ. kvaronhoron. Oni povis aŭdi la rememorojn de S. Podkaminer pri lia esperantistiĝo, pri la SAT-kongreso en 1926, plue pri la evoluo de la Esperanto-movado en Sovetunio. Sekvis i.a. informo, ke la nova soveta konstitucio estis vaste diskutita ankaŭ en la Esp. grupoj kaj jam tradukita en la Internacian lingvon.

La sovetaj esperantistoj preparas frazarlibreton por la venontaj Olimpiaj Ludoj en Moskvo 1980, laŭ la spertoj de la ludoj en Munkeno kaj Montrealo kaj ili estas pretaj akcepti la eksterlandajn samideanojn en la olimpia jaro kaj gvidi ilin al la konkursoj kaj urboj.

## EĤO DE LA AŬSKULTANTO

J. Mařík el Prago skribis al la moskva radio i.a.: Laŭ mia sperto 1) de normala radio-aŭskultanto, 2) de iama profesia Esperanto-tradukisto kaj parolisto de Radio Praha(1946 - 1950) mi povas diri, ke la Esperanto-programo estis bone farita kaj ĝi impresis ĉarme. Mi konsilus nur la personajn nomojn elparoli estonte pli emfaze, pli klare. Mi esperas,ke la programo ne estis lasta kaj oni povos reaŭdi ĝin.

## FORPASIS
## Ing. F. Sviták

František SVITÁK ne plu estas inter ni. Dum longaj jaroj ni kutimis vidi lin okupi respondecajn movadajn postenojn - tiujn de la prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, de la vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de la UEA-ĉefdelegito. Li grandparte meritigis pri tio, ke la enlanda movado povis prepari sin por la memstara vojo en la asocia kadro fine de la sesdekaj jaroj. Apenaŭ eblas montri amplekson de la taskoj , kiujn ing. SVITÁK konscience plenumadis en diversaj komisioj helpata de malgranda aro da kunlaborantoj.Menciindas liaj organizaj klopodoj, lia konstanta atento por la eldonaj aferoj aŭ por la MEM agado. Li ofte trovis la tempon por partopreni en diversaj esperantistaj arangoj kaj ni konis lin ankaŭ en tiaj okazoj kiel modestan, senpretendan kaj bonkoran homon kaj samideanon.

František SVITÁK subite foriris el nia rondo la 4-an de marto, aĝa 67 jarojn. La esperantista movado en nia lando perdas en li unu el siaj plej oferemaj kaj meritaj laborantoj.

## A.ODEHNAL
## HONORA MEMBRO DE ĈEA

Sepdekkvinjariĝis la 15an de februaro Antonín ODEHNAL el Městec Králové, esperantisto ekde 1915, post la unua mondmilito sekretario de ER en Slezská Ostrava, organizinto de esp.aranĝoj, instruisto en SET k.a.

Okaze de sia grava vivjubileo Antonín ODEHNAL estis nomita HONORA MEMBRO de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

■

Geedziĝis la 25.2.1978 en Vratislavice Věra F R Y S O V Á kaj Ladislav Š P Í N A . Sinceran gratulon!

■




Sklízeč píce SKPU 220

Rotační žací lišty ŽTR 165

Rozmetadlo universální RUR-5

Dojící stroje a zařízení typů DZ-9K, DZ-100

Dojírny DZD

Kruhové dojírny DZKD-15

VYRÁBÍ:
AGROSTROJ PELHŘIMOV

DODÁVÁ:
V ČSR PRODEJNÍ STŘEDISKA ÚPZT A AGRA PŘELOUČ. V SSR AGROTECHNIKA ZVOLEN.

VYVÁŽÍ:
MOTOKOV PRAHA, ČSSR





Módnost a kvalita

DUP

TO JSOU PŘEDNOSTI MANIKÚR, NECESERŮ A DALŠÍCH VÝROBKŮ DUP
DRUŽSTVA PRO VÝROBU KOŽENÉ GALANTERIE V PELHŘIMOVĚ

# LERNEJAJ * * NOVAĴOJ

En Belgio ekde decembro okazas Esperanto-kursoj en Libera Universitato de Bruselo. o Ĉiumarde en Londono okazas vesperaj Esp.kursoj ĉe Goldsmiths College, sub la titolo Enkonduko en Esperanton. o Esperanton oni instruas en la centra universitato de la ekvadora ĉefurbo Quito. o Preskaŭ 50 lernantoj de elementa lernejo en Okcidenta Berlino - Steglitz lernas E-on. o En Humboldt-Universitato, Berlino, prelegas al 60 studentoj d-ro D.Blanke pri la temo "Planlingvo en teorio kaj praktiko". o En la laboruniversitato de Cheste, Hispanio, studas E-on ĉirkaŭ 300 gelernantoj kaj 130 instruistoj lernas ĝin per korespondа kurso. o En Teherano antaŭnelonga malfermo de la universitataj E-kursoj altiris profesorojn kaj centojn da studentoj. o En Izraelo la Internacia Lingvo estas instruata en mezlernejo Kugel /Ĥolon/ kaj en la junulardomo de Telavivo. o Cent dudek lernantoj aliĝis al E-kurso en la universitato Fujen, Tajvano. o Laŭ nekompletaj informoj Esperanto estas instruata en 22 elementaj lernejoj de 10 urboj en Kroatio, Jugoslavio. o En Pollando funkcias 361 instruistoj de E-o. o Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (Vase Pelagica 8/I, YU 71000 Sarajevo) organizos en aŭgusto Internacian Junularan Laborbrigadon. o En F.R.G. 107 gejunuloj el 15 landoj partoprenis la 21an Internacian Seminarion de GEJ en Rotenberg sub la temo: Edukado - kun kiuj celoj?

## KONSULTIĜO EN POPRAD

Reprezentantoj de Esperanto-asocioj de eŭropaj socialismaj landoj kunvenis por la XI-a konsultiĝo en Poprad, Slovakio, en la tagoj 24-26a de marto. Laŭ la akceptita komuniko la partoprenintoj funde pritraktis eblecon de la plua kunlaboro en ĉiuj agadkampoj. La junularaj reprezentantoj prezentis ankaŭ siajn proponojn por progresiĝo de la aktivecoj en tiu ĉi grava medio. Pro la rezultoj atingitaj oni povas konsideri la lastan konsultiĝon eksterordinare sukcesa.

Z. Křimský

●

Nia legantino M. JOSKOVÁ el Prago atentigas pri iuj gramatikaj kaj aliaj eraraj faritaj en la lasta n-ro de Starto (1/78). Sur la paĝo 22: se ne estos momentale..; sur la paĝo 21: por trakti pri kiel; konkurso; je tago 8. aprilo; nesendu ktp. Ni pardonpetas.

●

La 7-an de februaro 1978 Václav Z Ý K A kaj la 31-a de marto 1978 Karel F R E M R fariĝis 70jaruloj.

●

La 14-an de januaro 1978 solenis sian oran edziĝan jubileon longjara membrino de LG Plzeň Maria U L Č O V Á kun sia edzo.

●



# NI LEGIS...

Bertolt Brecht: TRIGROŜA ROMANO. La fama dramverkisto, kies 80jaran naskiĝdatrevenon rememoris antaŭnelonge la tuta mondo, skizas en tiu ĉi proza verko "la timigan sistemon konsistantan el milito, negoco, krimo kaj sekso..." Post la romano de B. Apitz Nuda inter lupoj jam la dua romano en E-o eldonita en GDR. El la germana tradukis d-ro K.Schulze. Al internacia legantaro eble mankos iuj notoj pri la vivo k. verkaro de Brecht.




A.H.Tammsaare: LA MASTRO DE KÕRBOJA, eld. Eesti Raamat, Tallinn 1976, trad. B. Kart. La aŭtoro (vivinta inter 1878 - 1940) apartenas al la plej originalaj reprezentantoj de la estona romanarto kaj estas vaste konata ankaŭ internacie. La mastro de Kõrboja estas lia plej lirika romano; ĝi prezentas sintezon de la ĉiutageca kaj poezia polusoj de la estona kampara vivo post la unua mondmilito.

F.V.Dorno: LA AVENTUROJ DE L.R.M.STULTULOF LA X-a o LEVU LA MANOJN. Gaja komedio en tri aktoj. Reeldonis Hungara Esperanto-Asocio, 1977, resp.redaktoro V.Benczik. La unua eldono aperis en Literatura Mondo, 1939.

Pavel Rosa: SITUACIO DE ESPERANTO EN SLOVAKA SOCIALISMA RESPUBLIKO. Eld. AESSR en Bratislava, 1977, 34 paĝoj, fotopresita. Resumo pri la esperantistaj aktivecoj en kies centro la aŭtoro staras jam pli ol duonjarcenton.

Miloš Lukáš: KOLORA KALEJDOSKOPO. Sur sepdeko da paĝoj de la nova kajero de Panoramo (eldonis ĈEA en 1977, redaktis V.Kočvara, grafika aranĝo J.Klement) la leganto trovas elektitajn tradukojn el la plumo de la eminenta tradukisto en kaj el Esperanto kaj ankaŭ el la latina, greka kaj estona lingvoj en la ĉeĥan.

La selekto enhavas poeziaĵojn de la ĉeĥaj klasikuloj Jan Neruda, Jaroslav Vrchlický, J.S.Machar, Svatopluk Čech, V. Závada k.a., plue kelkajn rakontojn de Karel Čapek kaj Jaroslav Hašek kaj aparte la fragmenton el Nokto en Karlův Týn de Jaroslav Vrchlický. Speciale atentinda estas publikiĝo de la ciklo de kvin Zamenhofaj poemoj en la ĉeĥa lingvo.

Jen la du specimenoj:

J.V.Sládek: LA CINDRA MERKREDO

Post karnavala marda fest'
Merkredo Cindra mismienas:
de pli ol unu belulin
la pastra moŝt konfeson prenas.

Se farus do konfeson vi,
knabin' el ĉiuj plej gracia,
ne diru, ke vi amas min -
ĝi estas peko ja nenia.

Kaj se li tamen urĝos vin,
nur unufoje ĝin flustretu,
sed poste tion al mi mem
milfoje, karulin' ripetu!

L.L.Zamenhof: ZTIŠ SE MI, SRDCE!
(Ho, mia kor')

Ó, ztiš se, srdce, nebuš v nepokoji,
jak prolomit bys chtělo svoji skrýš!
Již tlumím stěží dávnou tíseň svoji,
ó, ztiš se, ztiš!

Zda po všech trudech z rozhodného boje
přec vyjdu vítězně - či padnu spíš?
V svém tepu bouřném ustaň, srdce moje,
ó, ztiš se, ztiš!

# RONDETA VIVO

B R N O - Ĝeneralan kunvenon de la Klubo partoprenis eksterordinare granda nombro da anoj. El la prezentitaj raportoj evidentiĝis, ke la Klubo sukcese plenumas sian mision kaj same sugestoj prezentitaj el la kunveninta anaro pruvis viglan intereson pri la plua gradiĝanta aktiveco. o Teatra vespero (17.1.) de Eva SEEMANNOVÁ "Jean kaj mi" de A. GUELMA katenis ĉiujn pro la drama enhavo kaj entuziasmiĝis pro la artisma prezento de la artistino. La teatraĵo okazis en plena salono de Klub školství a vědy, kie okazas regulaj klubaj kunvenoj. o Solena koncerto omaĝe en la jubilea jaro al Leoš Janáček (la 24.1.) estis preparita de la plej eminentaj artistoj de la muzika vivo en Brno, nome de H.Supová - Halířová, A. Růžičková - Pavlínová, solisto de opero kaj laŭreato de internaciaj konkursoj V. Halíř, R. Chudoba, violonvirtuozo A. Jíra kaj pianisto P. Kuchař. Neĉesanta aplaŭdo de la ĉeestintoj pruvis gradon de entuziasmo kaj dankemo pro la belega vespero. La koncerto okazis en plena salono de Klub školství a vědy. Same sukcesaj estis paroladoj de RNDr.J.ŠIKULA pri "Estonteco de ĝardenoj" kaj de prof.d-ro R.Horský el Prago pri la "Universala pac - kongreso esperantista en Greklando. Ambaŭ paroladojn akompanis multaj kaj ravaj lumbildoj.

Č E S K Á T Ř E B O V Á - Esperantista balo aranĝita de la loka grupo "Amikeco" finiĝis kun granda sukceso kaj simpatia eĥo en kelkaj ĵurnaloj kaj regiona disaŭdigo el Hradec Králové. La balon partoprenis 350 personoj el 20 lokoj de nia respubliko, inter ili 4 el GDR.

K Y J O V - La jarkunveno, okazinta la 25.1. konstatis plenumon de la laborplano por la jaro 1977. Publika parolado de la prez. de la loka klubo A. Jandík pri "Esperanto kaj ĝia signifo" estis sukcesa: rezultis kurso por 10 komencantoj, instruas F. Škrla, kurson por progresintoj en kadro de la klubaj kunvenoj gvidas A. Jandík.

L I B E R E C - Dekminutan intervjuon pri la historio de E-o kaj la agado de LG Liberec donis por la distrikta redakcio de Ĉeĥoslovaka radio prezidanto de LG A. Nedomlel. Komence de marto li kun tri aliaj membroj de porjunulara komisiono de ĈEA K. Přibilová kaj I. Junková (ambaŭ el Kladno) partoprenis internacian seminarion "Esperanto serve al la junularo" en Varsovio, kiu okupiĝis i.a. pri la junularaj kontaktoj inter la socialismaj landoj kaj pri TEJO.

L Y S I C E - En kadro de 670a datreveno de urbeto Lysice (apud Skalice), estis aranĝita ekspozicio de poŝtmarkoj kaj parto de la ekspozicio estis dediĉita al Esperanto. Preparis A. Bretšnajdr.

M Ě L N Í K - Membroj de Esperantista Grupo de Pacdefendantoj kolektis entute 2 520 kilogramojn de uzita papero por la bezonoj de nacia ekonomio.

M O S T - Ekde 1978 la rondetanoj kunvenadas en la nova kulturcentro "Máj" ĉe la magazino OBZOR kaj la restoracio JALTA, ĉiam l u n d e de la 18a ĝis la 21a horo.

P L Z E Ň - Enkadre de la 25-j. datreveno de MEM kaj omaĝe al ĝia iniciatinto R. Burda, oni aranĝos ekspozicion de infandesegnaĵoj (30x30 cm). Temo: "Infana imago pri la paco". Surdorse de la desegno indiku vian adreson, sekson kaj aĝon. Sendu ĝis aŭgusto 78 al: E-rondeto ĉe Uzina Klubo ŠKODA, Kopeckého sady, CS 301 35 PLZEŇ. La desegnaĵojn ni premios, sed ne resendos.

P R A G O - La prezidanto de ĈEA J. Vítek ricevis dankleteron de la islanda ŝtatprezidanto pro la donaco de ĈEA homore al la 62a UK en Rejkjaviko. o La eksterlanda ministerio de Korea popoldemokratia respubliko petis informojn de ĈEA pri la nunjaraj aktivecoj de MEM.

P Ř E R O V - Jarkunveno de la grupo (EK ĉe ZK ROH Přerovské strojírny) bilancis fine de januaro la pasintjaran agadon. En tiu ĉi periodo la kluba membraro plimultiĝis kaj lingve perfektiĝis en kursoj, renkontiĝoj kaj korespondaj kontaktoj. Dumjare oni propagandis produktojn de la lokaj maŝinfabrikoj, kunlaboris kun Distrikta Packonsilio kaj gastigis kelkajn eksterlandajn geamikojn. En la entreprena gazeto "Přerovský strojař" aperis 12 artikoloj pri la kluba agado kaj Esperanto.

NI PARDONPETAS la legantojn pro la inversa vicigo de la 3-a kaj 4-a paĝoj en la lastnumera aldono pri la SINDEFENDO. !

DARY SVAZU: V. Trojan, Žacléř - 200,- Kčs; J. Zákoutský, ml., Nová Paka - 15,-- Kčs; EK Jablonec - 349,-Kčs; A.Hejnová, Praha - 50,- Kčs; V.Kasal, Plzen - 40,-- Kčs .

# * EL EKSTERLANDO *

UNESKO ELDONIS 8 paĝan publikaĵon "Rekomendo pri Edukado por Internaciaj Komprenigo, Kunlaboro, Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj". Post grandnombra serio de afiŝoj en la internacia lingvo kaj grava publikaĵo "Oriento kaj Okcidento" ĝi estas jam la tria eldonaĵo far UNESKO.

EN ESPERANTO APERIS GENIA ROMANO de Cervantes, Don Quijote de la Mancha, ĉefverko de la hispana literaturo kaj de la monda literaturo en majstra traduko de F.de Diego kaj gravuraĵoj de G.Doré. La libro havas 820 paĝojn.

PER AŬTOBUSA LINIO "ESPERANTO" TRA KVIN LANDOJ. Internacia aŭtobusa linio "Esperanto" arangas ekde la 24. 7. - la 17.12.1978 dusemajnajn vojaĝojn tra kvin landoj laŭ la jena plano: Bydgoszcz - Katowice - Cieszyn-Žilina - Zvolen - Budapesto-Szeged - Timiŝoara - Craiova - Ruse - Veliko Tirnovo -Kazamlak - Plovdiv - Pisanica-Pamporovo - Smoljan -Kardzali - Burgas - Nesebar -Sljancev Briag - Varna - Ruse - Bukuresto - Braŝov - Debrecen - Miskolc - Vysoké Tatry - Krakovo - Lodz -Bydgoszcz.

PROFITU SOMERUMADON en pitoreska ripozejo Abaliget - proks. de Pécs, Hungario, okaze de Internacia Renkontiĝo Naturamika. Interesitoj : el ĈSSR aliĝu ĝis la 31. 5. 1978 ĉe L. Rýznar, A.Slavíčka 22, 568 02 Svitavy.

NATURISTOJ/NUDISTOJ, aliĝu al Internacia Naturista Organizaĵo Esperantista! Informojn kaj aliĝilon petu de H.Welger, Bismarckstr.28, D-3550 Marburg.

EN AUGSBURG okazos inter la 12a kaj 16a de majo la 56a Germana Esperanto Kongreso. Kiel aparte allogan programeron la organizantoj promesas prezentadon de la Esp. Teatro el Varsovio.

PRI ESPERANTO EN TELEVIDO. La 14-an de aprilo en la televida programo "BUŘINKY" el Ostrava rolis kiel gasto inĝ. V. KOČVARA, kiu parolis i.a. ankaŭ pri Esperanto.

NOVA IMAĜO PRI LA FERVOJO - tiel nomiĝas bela prospekto kun multaj koloraj fotoj, kiun eldonis en esperanto internacia organizaĵo por transportado de grandaj kontenerоj - INTERCONTAINER, kies membro estas inter 23 eŭropaj fervojoj kaj kompanio Interfrigo ankaŭ Ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj. En la prospekto vi povas legi pri moderna maniero de vartransportado ĉe fervojoj per kontenerоj kaj pri eblecoj, kiujn ofertas INTERCONTAINER , en ĉi tiu grava kaj esperiga speco de transportado. La menciita prospekto estas bela ekzemplo de eluzo de nia internacia lingvo por praktikaj celoj.

KOMITATO DE LA FERVOJISTA SEKCIO DE ĈEA anoncas al siaj membroj, ke la planita vojaĝo al Romo por partopre-



MAS

MODERNÍ OBRÁBĚCÍ STROJE

Kovosvit N. P. SEZIMOVO ÚSTÍ

NOSITEL ŘÁDU PRÁCE

ni la 30-an kongreson de IFEF dum majo 1978, kiu estis mendita ĉe vojaĝoficejo Rekrea ne povas efektiviĝi kauze de la vojaĝoficejo.

INTERNACIA LINGVO - INTERNACIA EDUKADO estas la temo de la 63a UK en Varna. Ĝin parte inspiras la Rekomendo pri Edukado de Unesko. La kongresanoj povos kontribui al tiu ĉi temo dum diskutrondoj: diversaj formoj de Esperanto-lernado (memlernado, studrondoj, korespondkursoj); kiel Esperanto povas kontribui al plenumo de la Rekomendo; la problemoj de komencantoj en la Esperanto parolanta komunumo; lernado de E-o ĉe pensiuloj; la eblecoj kleriĝi kadre de Esperanto-lernado.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

# )Lingva angulo(

"Ne riproĉu spegulon, se ĝi montras nigrulon".


Venis letero. Delikata mano skribis ĝin. La skribo tute ne estis malbela, tamen la skribintino pardonpetis pro la "skribaĉo", kiun ŝi motivis jene: "Ĉion mi devas fari tre rapide, ankaŭ la leterskribadon, se mi volas almenaŭ ion sufiĉi..." - Jes, kiam oni skribas tre rapide, tiam kutime rezultas nebela, ofte eĉ nelegebla skribo, skribaĉo. Sed kion volis la skribintino ... sufiĉi?

Festivalo - granda kultura evento kunvenigis samideanojn el multaj lokoj. Por saluti ilin kaj laŭdi ilian laboron venis kaj festparolis reprezentanto de la kulturministerio. Vigla membro de Esperantista redakcio penis rapide kapti ĉiun lian vorton per krajono sur papero. Vane, la oratoro parolis rapide, la redakciano ne sciis stenografi. "Bedaŭrinde, mi ne sufiĉis kapti ĉiujn valorajn vortojn!" plendis li.

Li ne sufiĉis ... kapti ...

La amikino samkiel la amiko fariĝis por momento viktimoj de sia nacilingva pensado. Ambaŭ tradukis la ĉeĥajn paroltu-




výzkumný ústav zdravotnické techniky BRNO

**zajišťuje výzkum a vývoj**

ZDRAVOTNICKÉ TECHNIKY V OBLASTI
LÉKAŘSKÉ ELEKTRONIKY
BIOCHEMICKÝCH LABORATOŘÍ
STOMATOLOGIE
RENTGENOLOGIE
STERILIZACE
PLASTICKÝCH HMOT

**SPOROŽIRO**

**ROZŠIŘUJE VÝHODY PODNIKOVÉHO SPOŘENÍ**

- SPOŘÍ SE BEZHOTOVOSTNÍ SRÁŽKOU Z PLATU, ÚSPORY SE ÚROKUJÍ 2%.
- NA ZÁKLADĚ VAŠEHO PŘÍKAZU UHRADÍ SPOŘITELNA Z ÚČTU PLATBY JAKO NÁJEMNÉ, POJISTNÉ APOD.
- NÁKUPY A SLUŽBY V OZNAČENÝCH PRODEJNÁCH A PROVOZOVNÁCH SLUŽEB V CELÉ ČSSR LZE PLATIT ŠEKEM.
- ŠEKY TÉŽ UMOŽŇUJÍ VYBÍRAT HOTOVOSTI U VŠECH POBOČEK A MÍSTNÍCH JEDNATELSTVÍ ČESKÉ STÁTNÍ SPOŘITELNY I SLOVENSKÉ STÁTNÍ SPOŘITELNY.

Navštivte nás. Rádi Vám podáme podrobné informace a založíme sporožirový účet.

**ČESKÁ STÁTNÍ SPOŘITELNA**



**MULTAJ VOJOJ**
**CELAS PRAGON**
**MULTAJ**
**TRANS PRAGO KONDUKAS**


Bonegajn aĉeteblecojn vi trovos en la magazenoj de Prago:

KOTVA, MÁJ, BÍLÁ LABUŤ, LETNÁ
kaj DĚTSKÝ DŮM /Domo de Infanoj/

- modernaj vendoformoj;
- riĉa varelekto sub unu tegmento;
- parkebleco de aŭtomobiloj ĝuste en la magazeno KOTVA;
- sabata vendado

Pražské obchodní domy
PRIOR

Kotva
Máj
Bílá labuť
Letná
Dětský dům



# VHODNÉ DOPLŇKY PRO AUTOMOBILISTY

Automobilový kloubový závěs za 365.- Kčs skládající se z litinového nosníku /cena 250.- Kčs/ a kulového čepu /cena 115.- Kčs/. Posíláme též na dobírku během 1 - 2 měsíců.

Bezpečnostní zámek řízení za 90.- Kčs.

Tlumič výfuku Škoda za 325 Kčs. Je vyroben z kvalitního ocelového plechu síly 1,5 mm.

Krycí plech motoru Škoda za 59.- Kčs. Vhodný pro vozy řady Š 100-120.Zabraňuje znečišťování motoru.

Tlumič i krycí plech byly kladně testovány Ústavem pro výzkum motorových vozidel. POZOR! Oba výrobky neposíláme na dobírku.

## Koupíte v prodejnách v. d. INKLEMO Praha

dříve KOVODÍLO Praha:

| | | |
|---|---|---|
| Praha 1 | tel. 26 68 24 | Skořepka 8 |
| Praha 2 | tel. 22 95 31 | Bělehradská 128 |
| Praha 4 | tel. 43 54 65 | nám. Hrdinů 5 |
| Praha 6 | tel. 34 15 76 | Kafkova 22 |
| Praha 7 | tel. 37 00 35 | Dukelských hrdinů 4 |
| Praha 8 | tel. 82 04 81 | Sokolovská 170 |
| Praha 9 | tel. 83 14 24 | Sokolovská 201 |
| Praha 9 | tel. 86 13 33 | Vetiškovo nám. 489 |

Písemné objednávky na poslání dobírkou jen závěsového kloubu a bezpečnostního zámku řízení adresujte na INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, Spojovací 11, 190 00 Praha 9, tel. č. 83 09 49, 83 39 18.


Dekdu ĉapitroj pri la sindefendo

La aŭtoroj: Inĝ.J.Novák kaj Inĝ.I.Špička

V.

Kian batalagon povas uzi laiko, kiu ĝis nun lernis nenion kaj ne havas tempon, emon aŭ intereson ellerni iun el kutimaj frapoj por sendanĝerigi la kontraŭulon? Solvante tiun ĉi taskon, ni devas eliri el movoj, kiuj estas kutimaj preskaŭ por ĉiu homo. Do ekzemple, ĉiuj eĉ sen ekzercado estas kapablaj en ŝuoj efektivigi kikon laŭ la fig.1 relative peze. La kikon ni nomu elsuba gambofrapo. Se la defendanto trafos tiamaniere la atakanton eĉ relative nepeze, li certe forprenos de la trafito la emon daŭrigi agresan agadon. Pli peza kiko povas facile trarompi la tibion de la atakanto.

Pri la batoj estas necese diri, ke sen uzo de armiloj laiko kutime ne kapablas bati sufiĉe peze, memkomprene se li ne estas tre forta. Malgraŭ tio ekzistas bato (la t.n. elekstera tordbrakofrapo, vidu fig. 2), kiun oni povas ellerni relative facile kaj kiu, se ĝi estas korekte uzita, sendanĝerigos la kontraŭulon tute certe. Oni trafu per ĝi la mentonon de la kontraŭulo de antaŭe, lian makzelon de flanke aŭ en la sama direkto liajn vangojn. La batoj celantaj menciitajn trafendajn lokojn ofte senkonsciigas la atakanton. Tamen, kiel ni jam diris, frapo kontraŭ tiujn ĉi punktojn povas la kontraŭulon ankaŭ mortigi, eventuale la morto aŭ vundo de la trafito povas ekesti kiel la konsekvenco de lia falo teren kaŭze de la antaŭiranta frapo.

Tio estas preskaŭ ĉio, kion oni povas rekomendi al la laiko por venki la atakanton sen uzo de armiloj. Tamen la defendanto estus tre nesaĝa, se li ne batalus per armilo, havante ĝin. Se necese, oni povas anstataŭ armilo utiligi ŝtonon, kiun oni tenas en la mano aŭ kiun oni ĵetas al kontraŭulo, stangon eltiritan el barilo, derompitan branĉon, ktp., kiel la t.n. okazan armilon. Por sendanĝerigi la kontraŭulon per nearmitaj brakoj oni devas kutime trafi la kapon de la kontraŭulo, alie la atakago povas esti senefika. Se oni klopodas sendanĝerigi lin per armilo, ĝenerale tio ne estas necesa. Ekzemple per bastono oni povas sendanĝerigi kontraŭulon batante liajn gambojn aŭ brakojn, simile se temus pri aliaj okazaj aŭ propraj armiloj. En ĉi okazoj estas etike neakcepteble ataki kontraŭulajn korpopatrojn, ĉe kiuj minacas al li pli granda probablo de serioza malutilo.

Tiuj, kiuj havas pli da tempo, nature povas ellerni ankoraŭ pluajn atakagojn, kiujn ni priskribos en la sekvonta ĉapitro malgraŭ tio, ke ili al la reduktita kurso de la sindefendo ne plu apartenas.

VI.

La plej gravaj batalagoj, kiujn oni uzadas en la sindefendo, estas jenaj: la rektmanfrapo (fig.3), la elekstera manfrapo (fig.4), la elsupra manfrapo (fig.5) kaj la manfrapo flanken (fig.6). El kikoj estas la plej gravaj: la rektpiedfrapo (fig.7), la rektpiedfrapo flanken (fig.8), la elsuba piedfrapo (fig.9), la elsuba krurfrapo (fig.10), la elsuba krurfrapo flanken kaj la elsuba piedfrapo flanken. Sekve de tio, ke la du lastaj kikoj diferencas de la elsuba piedfrapo aŭ de la elsuba krurfrapo nur per direkto, en kiu ili estas efektifigitaj, ni ne montras ilin sur la figuroj.

La supraj atakagoj esence sufiĉas por solvo de ĉiuj sindefendo-situacioj (se oni ne utiligas armilojn) kondiĉe, ke oni uzadas oportunan taktikon.





Fig.1
Elsuba gambofrapo





Fig.2
Eleksteratordbrako-frapo





Fig.3
Rektmanfrapo





Fig.4
Eleksteramanfrapo







Fig.5
Elsupramanfrapo





Fig.6
Manfrapoflanken





Fig.7
Rektpied-frapo







Fig.8
Rektpied-frapoflanken




a b c

Fig.9
Elsuba piedfrapo



a b c

Fig.10
Elsuba krurfrapo



a b c


Fig.11

Por la bezonoj de la sindefendo oni priskribis en literaturo grandan nombron de diversaj defendagoj, sed en la praktiko la plej rekomendindaj estas nur translokiĝoj. Dum la batalo ni konsilas uzadi tian translokiĝadon, ĉe kiu la movon komencas ĉiam la piedo, kiu estas la plej proksima al la sekvonta korpomovo. La alia piedo poste alŝoviĝas al ĝi. Ĉio estas videbla el fig.11. La defendanto do senĉese tenas sin disde la atakanto je tia distanco, ke la atakanto ne povu atingi lin per la brako, gambo aŭ armilo sen antaŭa alproksimiĝo.





## LACHEMA N.P. BRNO




Estas sukeraĵo por diabetikoj

SORBIT helpas al diabetikoj eĉ por maldikiĝi

**SORBIT** je přírodní sladidlo s nižší kalorickou hodnotou, které má všechny vlastnosti potřebné pro použití v kuchyni jako cukr

**SORBIT** je vhodný zejména pro přípravu pečiva a moučníků pro diabetiky

**SORBIT** je použitelný jako náhrada cukru při udržování vhodné tělesné váhy

**SORBIT** POMÁHÁ DIABETIKŮM ZPESTŘIT SVŮJ JÍDELNÍČEK

PRODUKTAS ** **LACHEMA n. p.** BRNO

uzino 6 en NERATOVICE

LA CHE MA

Žádejte v prodejnách POTRAVIN, JEDNOT a DROGERIÍ

## TESLA color SPEKTRUM

### TELEVIZOR PRO PŘÍJEM BAREVNÉ TELEVIZE

Více než polovina TV pořadů je vysílána barevně a jejich počet se stále zvyšuje: sportovní přenosy, inscenace, filmy, zeměpisné pořady, pohádky, reportáže z významných událostí, např. z kosmu aj.

Barevný televizor můžete obdržet i na půjčku: na účelovou se splácí měsíčně 250.- Kčs, na doplňkovou 200.- Kčs. Jinak Teslacolor stojí 8.500.- Kčs, Spektrum 9.500.- Kčs a Rubín 9.000.- Kčs.

V prodejnách obdržíte informace o službách spojených s vaším rozhodnutím dopřát sobě a rodině kouzlo barevné televize: o prověření kvality příjmu barevného signálu v místě bydliště, o odvozu a instalaci, o uvedení do provozu, o vhodné anténě atd.




## LA KREMAĴO POR TUTA JARO

**Kontraŭ malfavoraj influoj de la vetero la haŭton ŝirmas regula flegado per la kremaĵo NIVEA.**

Astrid

rnojn kun la verbo "stačit", elektante por ĝi malĝustan signifon el la kelkaj signifoj de la ĉeĥa verbo. La amikino volis diri, ke ŝi devas labori rapide por fini sukcese (aŭ utile) almenaŭ unu laboron, kaj la amiko celis esprimi, ke pro la rapida parolo li ne sukcesis skribi ĉion, kion la oratoro diris (ke lia lerteco - kvankam eble altgrada - tamen ne suficis por skribi same rapide).

La verbo "sufiĉi" aludas kvanton, kiu estas bezona por plenumo de faro, aŭ por kompletigo - nome kvanton de io: unu fiŝo sufiĉas por tuta tagmanĝo; mia forto ne sufiĉas por levi la ŝtonon; pro malforto mi ne sukcesis levi la ŝtonon.

Min trafis malbonŝanco. Pro malfrua veno de mia aliĝilo mi restis en la kongresurbo sen nokta ripozejo. La samideano en la akceptejo volis klarigi sian senkulpecon kaj fulmrapide tradukis sian ĉeĥan penson: "Via aliĝilo venis ĝis nun!" (Vaše přihláška přišla až teď!).

Li daŭrigis siajn klarigojn kaj asertis: "La aliĝilo venis ĝis lasta".

Ankaŭ mi fulmrapide retradukis laŭvorte la Esperantoparolon de la samideano en la karakterizan ĉeĥan parolon - kaj tuj komprenis: La samideano volis diri 1) "Via aliĝilo venis nur nun", kaj 2) "La aliĝilo venis la plej lasta" - (Přihláška přišla až poslední).

Atentu do, karaj legantoj, kaj ne traduku senpripense nur laŭvortare; la vortaro ofte ne povas doni klarigon pri ĉiuj signifoj de unu vorto.

-ver.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

### ★★★★PACMARŜO★★★★

PACMARŜON omaĝe al datreveno de la detruo de Ležáky aranĝas la 24an de junio Distrikta Packonsilio kaj ER. La partoprenantoj kunvenos en Ležáky ĝis la 10a horo. Aliĝoj: Esperanto, KD ROH Dukla Pardubice.

★★★★★★★★★★★★★★★★

### ★ INFORMO PRI EKZAMENOJ ★

Ĉi somere efektiviĝos la unuaj asociaj ekzamenoj el Esperanto. La ekzamena regularo kaj detalaj informoj estas haveblaj ĉe la prezidanto de la ekzamena fako de ČEA, ing. Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10, 747 05 Opava.

★

## PROPONO POR UNO

En sia dokumento "Lingvaj baroj en UN" (1977 - 02-26), la australia ambasadoro ĉe UN, s-ro Ralph Harry, persone proponas al UN la jenan 5-jaran planon por la enkonduko de la Internacia Lingvo:

1-a jaro: Kontrolo de terminaro fare de la Sekretariejo, necesa por eldonoj de bazaj dokumentoj kaj trejnado de interpretistoj de la 6 lingvoj de la Asembleo al Esperanto.

2-a jaro: Konstantaj delegitaroj (de ŝtatoj-membroj) k. anoj de la Sekretariejo ricevu bazan instrukcion adekvatan por akiri pasivan konon de Esperanto. Preparado de terminaroj en ĉefaj kampoj. Trejnado de interpretistoj de aldonaj 6 lingvoj (ekz-e, portugala, germana, japana, bengala, hindia kaj tamila).

3-a jaro: Interpretado de Esperanto al la 12 lingvoj estu ebla, sed la lingvoj de la Ĝenerala Asembleo estu ankoraŭ uzataj. Dokumentoj de la Ĝenerala Asembleo estu haveblaj en Esperanto, samkiel en la 6 oficialaj lingvoj.

4-a jaro: Dokumentoj estu produktataj je la kostoj de UN nur en originala lingvo kaj en Esperanto. Aliaj tradukoj je la kostoj de la koncernaj ŝtatoj. Interpretado en Esperanton sole.

5-a jaro: UN invitu aliajn organizaĵojn alpreni saman praktikon. Rekomendo al registaroj, ke Esperanto estu instruataj al ĉiuj nove varbitaj diplomatoj. UN provizu kursojn ĉe konferencejoj. Delegitoj povu paroli en sia propra lingvo, interpretado en Esperanton estu provizata el la 12 lingvoj kaj eventuale pliaj. Paroladoj en Esperanto estu stimulataj.

Laŭ s-ro Harry "la supra plano postulus aldonan elspezon en la unuaj 3 jaroj - sed la kosto ege malaltiĝus en la 4a kaj 5a jaroj... La granda valoro de la uzo de la Internacia Lingvo ĉe U N estus la alproksimiĝo al egaleco...

●●●

## ●●● EBLECOJ KAJ ILUZIOJ ●●●

Sinceraj vortoj de grafikisto

Mi ankaŭ sentas la neceson aldoni kelkajn vortojn al la rezultoj de nia enketo. Laŭ ĝi pli ol unu triono de la respondintoj ne estas kontenta pro la vizaĝo de nia STARTO. Krom diversaj iluziaĵoj - la rekomendo uzi "kretan" paperon kaj presi nian ĵurnalon el reliefa matrico - multaj opinioj devenas el nesufiĉa faka scio.

Estis iam la tempo, kiam ĉeĥoslovakaj esperantistoj tute malhavis propran ĵurnalon. Tamen aperadis diversaj regionaj bultenoj kaj cirkuleroj, kvankam kutime nur ciklostilitaj.

Kaj nun subite aŭdiĝas plendoj pri la pres-tekniko de nia ĵurnalo! Estas mirinde, ke oni agnoskas nur la t. n. "libropreson" (la pres-tekniko el reliefa kompostaĵo) kiel kulminon de la pres-tekniko. Tio estas grava miskompreno. La kompostado de reliefaj literoj - eltrovaĵo de Guttenberg el ĉirkaŭ la j. 1500 - jam estas malrapida pres-tekniko por nia epoko. Kaj ĉiu ne povas komposti - sed preskaŭ ĉiu scipovas tajpi. Por la matrico de nia STARTO ne estas decida, ĉu ĝi estas kompostita el reliefaj literoj aŭ tajpita. La kompostado kostas monon - tajpi la modelon por fotografota matrico povas volontulo. Per tio ŝpareblas preskaŭ duono de la pres-kostoj. Estas vero, ke la liter-bildo de la tajpliteroj ne estas same plaĉa kiel ekz. tiuj de Bodoni,Baskerville ktp. Tamen jam ekzistas - kompreneble sufiĉe multekostaj - tajpiloj kun pres-similaj literoj, elektrizitaj kaj ankaŭ elektronikaj. Ĉu iu el vi, estimataj kritikantoj, scias la manieron havigi por nia "tajpisto" similan maŝinon? Mi garantias; se ni havus tian maŝinon, vi tute ne divenus, ĉu ni "tajpas

Ofseto estas la plej moderna kaj plej rapida pres-tekniko. Ĝia eltrovinto estis germandevena naskiĝinto el Prago Alois Senefelder. Lia tekniko daŭras pli ol 180 jarojn, sed kun ĝia progreso kreskis ankaŭ la prezoj. La plej simpla maniero de ofseto estas "rotaprinto" - la tekniko de nia ĵurnalo.Kaj nun bonvolu kalkuli: nia ĵurnalo aperas dumonate, t.e. sesfoje jare. Kaj ĝi tamen devas esti informilo por la tuta ĉeĥa Esperanto-movado. La tempospaco inter la du numeroj estas sufiĉe longa kaj dume amasiĝas informoj. Tial ĉiu numero estas fakte plenŝtopita per ili. Preskaŭ tute mankas libera loko por diversaj grafikaj "elpensaĵoj" kaj ankaŭ por bildoj. Kaj la reklamoj, anoncoj? Ili prezentas la financan subtenon kaj ni ne povas nun elpuŝi ilin.

La financan problemon tuŝas ankaŭ la demando de la paperspeco. Ne ĉiu papero taŭgas por ofseto aŭ rotaprinto. Nian

paperon eblas konsideri bonkvalita - kaj sufiĉa laŭ niaj financaj eblecoj. Kaj ĉi tie mi emfazas, ke ankaŭ la paperprezoj en la tuta mondo lastjare plu kreskis. La pli frue naskiĝintaj esperantistoj, ĉu vi memoras, kiel ni serĉis kaj kolektis paperon por niaj bultenoj inter la jaroj 1951-1969? Tiam ne estis decida, kia estas ĝia kvalito, sed kion ni trovos sur ĝi.

Nun ni bezonas pli da efika helpo ol rifuza kritiko.

Jaroslav Klement

●●●

## INTERNACIA RADIO-SISTEMO »AMIKECO DE L' POPOLOJ«


Historio de la E-lingvaj radio-disaŭdigoj konsistas plejparte el kelkjaraj periodoj de la disaŭdigoj. Pli ol 100 radiostacioj disaŭdigis jam regule E-lingvajn programojn, sed nur kelkaj el ili atingis la jardekon. Tial la nuna stato ne estas pli bona ol antaŭ 50 jaroj. Eĉ, pli malbona, ja la radio-disaŭdiĝoj ĝenerale ege kreskis dum la lasta duonjarcento. Jen niaj tipaj problemoj:

1) Interesiĝo ekzistas (la E-istaro iniciatadas novajn elsendojn), sed post la sukceso la interesiĝo ekmalkreskas, preskaŭ estingiĝas. Fine je unu el la reorganizoj de la programoj oni ellasas E-on pro manko de interesiĝo.
2) La programoj estas naciaj (en la Internacia Lingvo), sed la interesiĝo de la esperantistaro estas internacia (t.e. ne direktiĝas al unu lando).
3) La stacio per siaj programoj intencas atingi la eksterlandon, sed la plej bona ricevebleco estas enlande. La programo ĝuste por la enlandaj esperantistoj estas seninteresa, ili preferas la staciojn en la nacia lingvo.

La nuna stato: la klopodoj en la tradicia disaŭdigo - sistemo kaj la interesiĝo de la E-ista aŭskultantaro nur hazarde renkontiĝas. Aŭskulto de la E-disaŭdigoj estas nur lingvo - ekzerc-eblecoj, kaj nur malofte regulaj inform-fontoj kaj amuzeblecoj. La solvo de tiuj problemoj povos esti nur rompo de la tradicia elsendo-sistemo kaj alĝustigo de la programoj al



ZOO PRAHA vás zve



la interesiĝo de la E-istaro. Inversa alĝustigo ne eblas.

Nia celo estu la realigo de karuselaj radio-disaŭdigoj - ekz. kvin diverslandaj stacioj tute sendepende produktas siajn unuhorajn programojn, sed ĉiu stacio disaŭdigas kvinhorajn programojn: la propran kaj la kvar aliajn sinsekve. La rezulto: senprecedence varia, envere internacia programo, bonege ricevebla en ĉiuj kvin landoj (krome ankaŭ en la ĉirkaŭo de la landokvino).

La realigo de la karuselaj disaŭdigoj havas premisojn : a) la landoj estu politike proksimaj (ke la transpreno de la programoj ne kaŭzu konfliktojn); b) la landoj estu geografie proksimaj (ke la telekomunikad-kostoj ne estu troaj, prefere ili estu pli malaltaj ol la kostoj de la memstaraj program-produktoj).

Ekzistas jam "arkimedaj punktoj" por konstrui la sistemon: unu el la momente funkciantaj stacioj, precipe Varsovio. Eblas alkroĉi Bratislavon. Relative facile ni povus refunkciigi en tiu nova maniero la tradiciriĉajn Budapeŝton kaj Pragon.

Ĉu la establigo de tiu nova sistemo estos tre malfacile solvebla? Nepre. Ĉu multaj anticipe rifuzos ĉiuspecan kaj ne tradician iniciaton? Nepre. La malfacilaĵojn ni enkalkulu. Sed malfacilaĵo ne egalas maleblecon!

Krom la malfacilaĵoj estas ankaŭ aliaj konsideroj:

a) facile ricevebla internacia programo altiros la esperantistaron, ne mankos interesiĝo;
b) por la Internacia Lingvo ni trovos la ĝustan rolon, tiel ni fortigos efike la amikecon de la popoloj;
c) tian sistemon likvidi estos pli malfacile, ol establigi, ja internaciaj kontraktoj ligos la partoprenantojn;
ĉ) tiu internacia radio-sistemo AMIKECO DE L' POPOLOJ kreas tute novan, favoran medion por nia movado en la koncernaj landoj, ĝi reefikos pozitive al nia movado, grandaj niaj fortostreĉoj pluroble konvertiĝos.

D-ro Árpád Rátkai



## Z PEDAGOGICKÉ SEKCE

29. října 1977 se konal první aktiv obnovené Pedagogické sekce ČES za účasti 11 aktivistů ze sedmi míst. Zápis o jednání nám prozrazuje mj., že tříčlený kolektiv sekce sestavuje přehledy o vyučování a praktickém používání esperanta mezi dětmi do 16 let. Jako první dvě studijní statě pro učitele esperantisty a pro učitele nové (laiky) se připravují práce J.KLEMENTA a O.SITTAUEROVÉ. Jako pomůcku pro pracovníky ve školních zájmových kroužcích připravuje sekce hru "Setkání" od S. Zedníkové, kterou upravily A. Echtnerová a ing. M. Strnadová. Hra byla mezitím již předvedena v Pardubicích (J.Rybáčková) a v Praze (E.Urbanová).

*

V klubech mezinárodního přátelství (Interklubech) nyní pracuje již 28 lektorů esperanta pro děti. Převážný podíl na této práci mají 24 účastníci semináře, který v září 1977 uspořádala komise mládeže ČES.

Pedagogická sekce nemohla v minulém roce uspokojit více než 120 dětí-esperantistů z 9 zemí, které si chtěly esperantsky dopisovat také s našimi dětmi.

## KORESPONDI DEZIRAS

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kcs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Vladimír Rotrekl, Palackého 15, 669 00 ZNOJMO, Ĉeĥoslovakio - dez.interŝanĝi bk k. glumarkojn kun E-teksto kaj listojn kun kantoj en E-o.

Lenka Ulčová, Podluhy č.173, 268 01 p.Hořovice,okr.Beroun 14j., dez kor pri historio, muziko, filmoj kaj volas iŝ pm, bk.

Jitka Sukaná, Engelsovo nábř. 74, 120 00 PRAHA 2, Ĉeĥoslovakio, 26j, serĉas amikojn el t.m.

Inĝ.Vadim Gruŝĉinski dez kor kun ĉiuj landoj k. iŝ pm,bk. Lia 13j filino Marina dez kor ruse aŭ esperante kun gesamaĝuloj el soc.landoj: USSR , 327029 NIKOLAJEV, pk 9. (pk=jaŝcik).

Esperantista societo "Balkana Stelo", pk 90, 5600 TROJAN, Bulgario.

Maria Czopek, 22j med. laborantino, KRAKÓW 47,Nowy Prowocim 30-900, str.Teligi 20/57, Pollando.

R.Stempień, Ç.Sklodowskiej 9, 59-840 Zavidow, Pollando.

Arne Bengtsson, 60j, Åbybergsgatan 32, 431 31 Mölndal, Svedio.

Al kor.servo de Japana Esperanto-Instituto skribu viajn agon,sekson,profesion,hobion kaj adreson.

Josip Pleadin, B. Markača 1, Jugoslavio - 433 50 Durdevac per bk.

P.Bartulec, 735 34 Stonava n-ro 100, d. Karviná, ČSSR, int kol bk kun urboj.

Pavla Jodasová, 12j, V Štíhlách 1318/15, 142 00 PRAHA 4 - Krč dez kor kun Latinameriko (int.pri kulturon, vojaĝon, naturon, kol bk kaj suvenirojn).

Josef Zákoutský, Havlíčkova 430, 509 01 Nová Paka.

E-societo "Progreso" Likaravelov 22, 5180 Polski Trombež, Bulgario.

SOVETUNIO: Švec Zinajda,str. Herooj-Sibirjakovoj 54,kv.61 940 62 VORONEŽ • Panova O., p.k. 684, 665805 Angarsk. • Pantelejevna Pozdnjakova,str. Selezneva d. 100 ap.109,350-028 Krasnodar, 28-USSR • V. J.Kovalenko, 34j, 350-020 KRASNODAR 20,str. Komunardov d.239,ap.14 • N.Nemoljajeva, 22j, 350 047 KRASNODAR, 47, str.Slavjanskaja d.75,ap. 61. • Z.S. Zolienko, 25j., 353 222 KRASNODAR,v. Jablunovka, str.Puškina 92. • T. K.Bessonova, 26j, 350 020 u. Krasnodar 20, str. Odesskaja d.25, ap.48 • N.P.Vovenko, 23j, 350 062 KRASNODAR - 62, ul.Vorovskogo d.237.

Pollando: Teresa Maciejewska, 66-408 Gorzow Wlkp.,ul.Gwarači Ludowej 118/2. • Junulara Klubejo Stacidoma, ul. Handlowa 21, 34-300 Żywiec. • Eva Sotomska, 13-200 DZIALDOWO, str.Nidzická 11/29.• Teresa Gebala, 13-200 DZIALDOWO, str. Kajki 4 • Jan Regulski, 13-200 DZIALDOWO, str. Grunwaldzka 4, Lic. zawodowe. • Anna Rogowska, 13-200 DZIALDOWO, str.Nidzicka 17/7. • Dorota Laskowska, 13-200 DZIALDOWO, str. Waryńskiego 2/8. • Jolanta Bazydlo, 13-200 DZIALDOWO str. Nidzicka 11/35C • Irena Dadun, 13-200 DZIALDOWO str.Sklodowskiej 12/2 • Janina Wožniak, 13-200 DZIALDOWO, str.Jagielly 46m4 • Miroslawa Gawlinska,13-200 - DZIALDOWO,str.Jagielly 36 • Elžbieta Kaczmarczyk, 13-200 DZIALDOWO, str.Pocztowa 9c / 12 • Stanislaw Staszewski, Bedoń, ul. Ogrodowa 1,95-021 Andrzejow. • Ewa Kuczyńska 16j, Zwiebodzice, Os. Przod. Pracy 2a m.12, Pollando

ANONCO POR LA GEANOJ DE ĈEA KAJ AE-SSR kiuj volus pasigi la ĉi-jaran libertempon - de junio ĝis septembro - en la belega refreŝiga regiono apud valbarajo SEČ sur la rivero Chrudimka. Mi povos loĝigi tre malmultekoste 1 - 5 personojn en du ĉambroj de trankvila familia vilao,proksimume 600m de lago. Ebleco de memkuirado au manĝi en restoracioj au en motelo.

ATENTIGO: Por la skriba konfirmo de via alveno sendu frue la afrankitan koverton al: Ladislav Mrázek, Gagarinova 378/10, 530 09 Pardubice 9.



# MIL MEJLOJ

TISIC MIL




1. Mejlo-mil' post mia krur',
forviŝiĝis jam la spur',
multe jam laciĝis mi kaj la ĉeval'.
Ja mejlo-mil post mia krur',
mi havas celon unu nur,
kie blanka domo staras en la val'.

2. Sub dekliv' ĉe la river',
ĉe kastora berier
vivas la gepatroj en rev' de infan'.
Ja majlo-mil post mia krur',
mi havas celon unu nur,
la konatajn blankajn murojn de kaban'.

3. Mejlo-mil' post mia krur',
io pelas min al kur',
vojon konas mi, la dom' ne ŝanĝis sin.
Ja mejlo-mil post mia krur',
mi havas celon unu nur,
tie vivas miaj patro kaj patrin'.

4. Mi ekvidos post moment',
kamenfumon sur tegment',
la oblikvan gablon stari sub ĉiel'.
Ja mejlo-mil post mia krur',
mi havas celon unu nur,
la malnova blanka dom' jen mia cel'.

El la ĉeĥa tradukis Josef Cink





# ▪ INFORMACE SEKRETARIÁTU ▪

pro zájemce o letošní 34. kongres TEJO

Kongres bude zahájen v městě Veliko Trnovo dne 22.7. a bude trvat do 29.7.1978. Příhlášky vám poskytne Komise mládeže ČES. Napište si o ně na adresu: M. Walterová, Lublaňská 49, Praha 2. Nepište na adresu svazu! Po doporučení komise a po složení poplatků zajistíme vaši přihlášku v BLR převodem zaslané částky. Krajní termín, kdy lze platit ve výhodné sazbě je 31.5. (rozhoduje razítko na složence). Složenku dostanete zároveň s přihláškou.

Částky za kongres TEJO podle věku a data zaplacení včetně administrativních výloh:

| v ě k : | do 31.5. : | po 31.5. : |
|---|---|---|
| do 20 let včetně | 815,-- Kčs | 910,-- Kčs |
| 21 - 25 let | 840,-- Kčs | 1.010,-- Kčs |
| 26 - 32 let | 935,-- Kčs | 1.105,-- Kčs |
| 33 a více let | 1.055,-- Kčs | 1.225,-- Kčs |

Pokud jste již zaslali některé poplatky na adresu svazu, rozdíl vám doúčtujeme nebo vrátíme po odečtení administrativních výloh. Po 20.6. nebudeme přijímat další platby a peníze vám vrátíme.

Kdo vyplnil přihlášku a neodeslal peníze, nechť si urychleně napíše o složenku na adresu svazu. Bez předchozího zaplacení nemůže být v BLR nikomu zajištěn nocleh, ani vstup na sjezd, neboť poplatky nelze uhradit dodatečně v bulharské měně.

▪

INTERESATOJ pri la lasta eldono de Panoramo kiu prezentas selekton el la tradukista verko de M. Lukáš, mendu la kajeron en ČEA. Prezo 16,-- Kčs.

▪

LETOS OPĚT PODĚBRADY! Pro všechny, kteří se chtějí sejít s novými absolventy písemných kurzů esperanta, uspořádá koncem května setkání stejně jako loni, místní skupina v Poděbradech pod záštitou ČES. O bližší informaci si urychleně napiště na adresu: Pavel Polnický, novostavba Polabec, 290 01 Poděbrady.

▪ ▪ ▪

▪ ▪

▪

STARTO - tiskový orgán Českého esperantského svazu, Praha 1, Jílská 10. Řídí redakční rada: odpovědný redaktor O.Kníchal, zástupce redaktora Dr. J. Jermář, CSc, členové: J. Cink, Z. Hršel, J. Mařík, J. Vondroušek, Ing. V. Kočvara, tajemník Z. Křimský. Grafická úprava: Milan Labašta. Vychází 6x ročně. Tisk zajištěn výrobnou Technického ústředí knihoven při SK ČSR - Praha. Předáno do tisku: 14. dubna 1978.



RUKOV

RUKOV

výrobce

elektrometalizačního zařízení

pro antikorozní ochranu

ocelových konstrukcí

FABRIKAS

ELEKTRO-METALIZAJN EKIPAĴOJN

KONTRAŬ KORODO

DE ŜTAL-KONSTRUAĴOJ

RUMBURK

60 LET POKROKOVÝCH TRADIC

1918 - 1978

MECHANICKÉ A ELEKTRICKÉ PSACÍ
STROJE ※ KALKULAČNÍ STROJE
STROJE A ZAŘÍZENÍ PRO VÝPOČET-
NÍ TECHNIKU ※ STRÁNKOVÉ DÁLNO-
PISY ※ DISKOVÉ PAMĚTI ※ NAFTOVÉ
MOTORY ※ LOVECKÉ A SPORTOVNÍ
ZBRANĚ ※ MĚŘIDLA, NÁSTROJE A
UPÍNAČE ※ JEDNOÚČELOVÉ OBRÁBĚ-
CÍ STROJE ※ TRANSFERNÍ LINKY

MEKANIKAJ KAJ ELEKTRO-TAJPILOJ
KALKUL-MAŜINOJ ※ MAŜINOJ KAJ
EKIPAĴOJ POR KALKUL-TEKNIKO
PAĜAJ TELEAŬTOGRAFOJ ※ DISKAJ
MEMOROJ ※ NAFT-MOTOROJ ※ ĈAS-
KAJ SPORT-PAFILOJ ※ MEZURILOJ,
※ INSTRUMENTOJ KAJ FIKSILOJ ※
UNUCELAJ PRILABORAJ MAŜINOJ
※ TRANSPORT-LINIOJ ※

# ZBROJOVKA BRNO

národní podnik
nositel
Řádu republiky ※ Řádu Vítězného
února ※ ※ ※ Řádu práce

nacia entrepreno
honorigita per
※ Ordenoj de Respubliko ※
de Triumfa Februaro ※ de Laboro